

la naska fasko

Numero dek du
2009-07-14
mardo

La ĉiutaga ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto

Kio okazos hodiaŭ?

★ **2:30 ptm: Ekskurso al Monto Soledad**
Kie: kolektiĝu antaŭ Asante

Ni iros aŭte al proksima, surmonta parketo en La Jolla por ĝui la panoramon.

Svisaj bankbiletoj

de Uwe MEYER

Merkredon vespere Spomenka rakontis al ni la fascinan historion de la svisa pentristo Ferdinand HODLER kaj lia iama koramikino Jeanne CHARLES kies portreto ornamis la 50-CHF-bankbileton de la dua svisa bankbileterio (1911) je kiu la pentristo kunlaboris. Se vi ne bone vidis ĉi tiun portreton aŭ deziras vidi ĝin denove, mi rekomendas la retpaĝaron de la Svisa Nacia Banko (germane: *Schweizerische Nationalbank*). Jen la retadreso kie vi povos rigardi la faman bankbileton kaj trovi klarigojn en kvar lingvoj (inkluzive la anglan):

<http://www.snb.ch/en/i/about/cash/history/id/cash_history_serie2> (2009-07-09).

Kaj se vi ŝatas vidi la novan serion de bankbiletoj kiun la Svisa Nacia Banko estas preparanta por ke ĝi anstataŭigu ekde aŭtuno 2010 la aktualan cirkulantan ekde 1995, vizitu la jenan retpaĝon:

<http://www.snb.ch/en/i/about/cash/newcash/id/cash_new_result/3> (2009-07-09).

Ili estas belaj, la novaj bankbiletoj, ĉu ne?

Alia maniero Potter-umi

Ĉu vi deziras vidi la sesan filmon de *Harry Potter* sen piediri tra la hantita arbaro, pagi pli ol dek dolarojn, dormeti dum la plej bonaj partoj de la filmo, kaj finfine stumbli liten ĝuste antaŭ la tagiĝo? Jen solvo!

Merkredon, ni (Vido kaj Koto) veturos kinejen ĉirkaŭ la 2-a ptm kaj revenos je la 6-a. Biletoj por posttagmeza filmo kostas nur po \$8.50 rete. Ni povos kunporti tri personojn; kontakti nin se vi volas veni.



Enirigu min sub vian flugilon

de Hayim Nahman BIALIK, 1905
tradukis el la hebrea lingvo Shai MOR, 2009

Enirigu min sub vian flugilon,
kaj iĝu al mi patrino kaj fratino.
Donu al mi vian sinon—liton por mia kapo,
neston por miaj nerealigitaj preĝoj.

Je tempo por kompato, inter la krepuskuloj
venu kaj mi malkovros al vi la sekretojn de
miaj tormentoj.
Onidiro: estas en la mondo JUNECO—
Kie estas la mia?

Kaj alian sekreteton mi konfesos al vi:
Mia menso brulis en flamo;
Onidiro: AMO estas en la mondo—
Kio ĝi estas?

La steloj trompis min
ekzistas songo—sed ankaŭ ĝi forpasis;
nun mi havas nenion en la mondo—
mi ne havas ion ajn.

Hayim Nahman BIALIK (hebree: חיים נחמן
ביאליק) 1873–1934, estis unu el la pioniroj
de la moderna hebrea poezio, kaj li fariĝis la
nacia poemisto de Israelo.



Ina, Franklin, Marco, Bernhard kaj Tor vespermanĝas
en Café Ventanas. Foto danke de Franklin
MONTENEGRO-RODAS.



La Verda Stelo

de Venero MOELLER

Ĉu verda stelo vere ekzistas? Ni povas
distingi ruĝajn, flavajn, blankajn kaj bluajn
stelojn teleskope, sed neniam verdajn ste-
lojn. Kial ne?

Ni scias, ke la koloro de la steloj dependas
de ties temperaturo—la varmaj steloj estas
bluaj, kaj la malvarmaj ruĝaj.

Fakte, nia suno estas verda; nek tro varma,
nek tro malvarma. Ĝi eligas ĉiajn kolorojn,
videblajn kaj nevideblajn. Ĉiuj koloroj mik-
siĝas, kaj niaj okuloj povas vidi nur
blankan lumon.

Verdo estas en la mezo de la videbla
spektro—kaj tial ĝi tre taŭgas por la
neŭtrala lingvo Esperanto.

La dogona mistero

de Drissa Flayoro DIAKTÉ

Unu tuta generacio de etnologiistoj skribis plurajn universitatajn librojn pri la dogonoj (nigrla popolo en la Sahela regiono, sude de la rivero Niĝero, precipe troviĝanta en Malio kaj en Burkina-Faso). Vi trovos alproksimiĝon sciencajn kaj profundan al la dogona lingvo en “Maskoj dogonaj, Marselo Griolo, Instituto de Etnologio, reeldonaĵo 1994”.

En 1931, Marselo GRIOLO ŝipveturis al Afriko por misio daŭranta du jarojn. Ĝi nomiĝis “La misio Dakaro-Djibutio” kaj organiziĝis per la Instituto de Etnologio de la Universitato de Parizo kaj per la Muzeo de Natura Historio. GRIOLO estis akompanita per Marselo LARGEO (Marcel LARGUET), Miŝelo LERISO (Michel LEIRIS), Eriko LUTENO (Eric LUTTEN), Ĵano MUŝEO (Jean MOUCHET), dum pli posta tempo ankaŭ per Andreo ŜEFNERO (André SCHAEFFNER), Deborao LIFŝICO (Déborah LIFSZYC), Gastono-Luiso RUO (Gaston-Louis ROUX).

En la krutdeklivoj apud Bandjagarao en la Franca Sudano (hodiaŭa Malio) la grupo renkontis la unuan fojon la dogonojn de Sangao (vilaĝo en Dogonujo), kaj komencis kolekti riĉan dokumentaĵon pri la dogonaj tradicioj kaj la religio, per interfaka esploro. Precipe Marselo GRIOLO, ek de tiu unua ekspedicio, kaj dum la du sekvaj misioj en 1935 kaj 1937, interesiĝis pri la institucio de la “Aŭa”, la societo de maskoj, implikanta ĉiujn virojn dogonajn. La libro *Maskoj Dogonaj*, klasike reeldonita plurajn fojojn ek de 1938, same estas pripensoj kaj pridemandoj je la signifo kaj la rolo de tiu institucio. “La Vulpo Pala, Marselo Griolo

kaj Ĵermeno Diterleno, Instituto de Etnologio, 1991”.

La mito dogona ne nur rilatas al la aventuraj faroj, al rivaleco inter la dioj aŭ ankorau al la aferoj de amo aŭ malamo—amo de dio, maliceco de la malbonulo—kiel prezentas al ni la aliaj religioj. Sed ĝi atestas pri serioza esploro de propraj kondiĉoj de la vivo kaj de la morto. De tio venas ĝia biologia aspekto preciza: la universo estas certa, konsiderata kiel unu tutaĵo, sed ankaŭ kiel iu korpo vivanta, ordata, funkcia. Ĝi prezentas iun konstruadon de la universo—ek de la sistemo stelara, ĝis la plej malgranda polvo, pretere la homon, imago mikroskopa de ĉi tiu mondo. “Dio de akvo: Intertrakto kun Ogotemeli, Marselo Griolo, eldonejo Fajardo”.

La unua restado de Marselo GRIOLO inter la dogonoj okazis en 1931. Dek kvin jarojn post la komenco en la krutdeklivoj, Marselo GRIOLO alvokiĝis per maljuna blinda ĉasisto, kiu malkaŝis al li aspekton—ĝis tiam ne konjektatan kun la kulturo dogona—kreadan miton, vizion simbolan pri la universo, konceptaĵo organizata per la persono kaj per la vorto klariganta la mondon.

La dogona ontologio tiel malkovris novajn horizontojn al la etnologiistoj kaj evidentiĝis “la skeleton de iu monda sistemo, per kiu renversiĝis—la subo al supero—la tradiciaj ideoj pri la nigrla pensmaniero, ĝenerale nomata primitiva pensmaniero”. Skribinte tiun libron, Marselo GRIOLO proponis—unuflanke rigardata de nefakista publiko, kaj sen la scienca aparato, kies laboro rezerviĝas al solaj erudiciuloj, aliflanke malkaŝado al okcidenta publiko—“kosmogonion same riĉa kiel tiu de

La NASKa Fasko

Hesiodo, metafizikon prezentantan la avantaĝon elstreĉantan en milojn da ritoj kaj gestoj pri unu sceno, kie mortiĝas multaj vivantaj homoj”. “La Dogonoj, Nadino Vanono kaj Miŝelo Renodo, Eldonejo de la kverko, 1996”

En 1931, krom la misio Dakaro-Djibutio, la etnologiiŝto Marselo GRIOLO kaj lia laborgrupo estis inter la unuaj esplorantoj, kiuj esploris Dogonujon. Tiu regiono troviĝas apud la interna kurbiĝoflanko de la rivero Niĝero. Tie disvolviĝis unu el la plej eksterordinaraj civilizacioj de la nigrula Afriko. Sesdek jarojn poste, la fotografisto Miŝelo RENODO ekvojaĝis serĉante tiun belegan landon. Li tie retrovis la pragepatrajn gestojn de ĉi tiu kampula popolo, la ritojn kaj la kultojn, restantajn ankoraŭ iomete funkciajn, malgraŭ de la forta penetro de Islamo. Nadino VANONO, etnologia filmfaristino ĉe CNRS (iu filmfarejgo), atestas pri lia ekscio de tiu tereno. Sesdek jaroj, tio ankaŭ estas la periodo inter du sigifestoj, tiu ceremoniaro, markanta la tempon necesan al la homoj, transdoni la sciaĵon de unu generacio al alia. “La Dogonoj de la Malio, Ĵerardo Bodveno, Eldonejo Armando Koleno”.

Aperaĵo pli nova prezentiĝas al ni per Ĵerardo BODVENO. Lia verko, subtenata per nombraj desegnaĵoj kaj fotoj, priskribas la ĉiutagan vivon kaj la dogonajn ritojn. “La sekreta lingvo de la Dogonoj de Sangao, Miŝelo Leriso, Eldonejo Ĵano Miŝelo Plaso”.

Verko per kio Miŝelo LERISO proponas pripensadon pri la religiaj tekstoj, la ceremoniaro de la sigifesto kaj la sekreta lingvo nomata Sigio.

*Tradukita kun helpo de malnova amiko,
Johano Vilhelmo BOHEMIO.*



Dogona masko.

*La NASKan Faskon redaktas via afabla helpinstruisto Hoss, sed **li nepre bezonas viajn kontribuojn!** Se vi ne sentas vin komforta pri verkado, ne timu; li helpos vin korekti kaj poluri. Ĝuste nun, efektive, li senpacience kaj avido atendas viajn kontribuojn—ĉu fotojn, desegnaĵojn, artikolojn, poemojn, amo-leterojn... Sendu materialojn rete al [<nask.esperanto@gmail.com>](mailto:nask.esperanto@gmail.com) aŭ portu ilin piede al *Asante* #127.*